



2(156)
2016

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Elżbieta Zechenter-Spławińska

Rzeczy załatwione

Błogosławione niech będą
drobne załatwianka
codzienne małe sprawy
spisane na kartkach
zupy ugotowane
i pomyte garnki
krzątanina nieważna
którą można skreślić
która nie pozostawia
odcisków w pamięci
Błogosławione niech będą
powszechne obrządk
które mają początek
które mają koniec
Błogosławione niech będą
rzeczy załatwione
pozwalają zapomnieć
o tych wszystkich innych
Sprawach, Uczynkach, Kwestiach,
Udrękach, Tęsknotach,
Zaplątanych Uczuciach
nie do rozplątania
wrośniętych w nasze serca
wbitych nam do głowy
których nie wykreślimy
z żadnej strony życia
których ani się pozbyć
bo stały się nami

Aĵoj aranĝitaj

Benataj estu
mikraj aranĝaĵetoj
ĉiutagaj malgrandaj aferoj
listigitaj sur folioj
supoj kuiritaj
kaj lavitaj potoj
mastrumeto negrava
kiun oni povas forstreki
kiu ne postrestas
premsignojn en la memoro
Benataj estu
ĉiutagaj ritoj
kiuj havas komencon
kiuj havas finon
Benataj estu
aĵoj aranĝitaj
ili permesas forgesi
pri tiuj ĉiuj aliaj
Aferoj, Faroj, Problemoj,
Turmentoj, Sopiroy,
Implikitaj Sentoj
ne por malimpliki
enkreskitaj en niajn korojn
enbatitajn en niajn kapojn
kiujn ni forstrekos
el nenia paĝo de la vivo
kiujn ne eblas forigi
ĉar ili fariĝis Ni

tradukis Lidia Ligęza

Elżbieta ZECHENTER-SPLAWIŃSKA estas krakovanino, poetino, prozistino, aŭtorino de baladoj, kanzonoj kaj versaĵoj por infanoj. Ŝi eldonis 15 poezi-volumojn kaj kelkajn librojn proze. Lastatempe: Notoj kaj songoj, 2015 (en serio: Poetoj de Krakovo). Ŝiaj poemoj oni tradukis al lingvoj: germana, ĉeĥa, rusa, hungara, angla, turka. De multaj jaroj ŝi gvidas fakajn okupojn por junaj literaturistoj. Ŝi apartenas al Asocio de Polaj Verkistoj, Filio en Krakovo kaj al Asocio de Aŭtoroj ZAiKS. En la jaro 2015 ŝi ricevis Bronzan Medalon „Merita por Kulturo – Gloria Artis”.

Podlaĥio ankoraŭfoje

Kiel ĉiujare la amikoj kaj samideanoj de Bjalistoko aranĝis meze de decembro 2015 feston dediĉitan al L.L. Zamenhof. Mi havis ĉijare la precipan kaŭzon en ĝi partopreni, ĉar la organizantoj invitis min prezenti libron, en kiu troviĝas multaj miaj tradukoj.

Kun mia amikino Grażyna ni atingis Bjalistokon post preskaŭ tuttaga vojaĝo, sed por la konsolo esperante varman akcepton kaj gastamon de mastroj, ekz. de sinjorino Sabina, kiu jam trian fojon emis gastigi nin en la propra loĝejo.

La programo de XVI-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj (11–13-an de decembro de la jaro 2015) okazis interesa kaj varia. La nova, juna estraro de la bjalistoka organizaĵo sub gvidado de Przemysław Wierzbowski sukcesis ligi fruktodonajn kontaktojn kun la valora, tute juna aŭ iome pli aĝa esperanta junularo en kaj ekster Pollando, kio estis sukcese videbla dum elpaŝoj de la itala grupo kaj kio tre ĝojas.

Brile prezentiĝis reprezentantoj de mastroj. Nina Pietuchowska preparis prelegon kun lumbildoj pri kopiistoj de la bjalistoka geto montrantan emon arte labori malgraŭ kondiĉoj absolute malproksimaj de normaleco.

Konrad Andrzejuk elpaŝis kun raporto de unika vizito en la Norda Koreo. La lumbildoj montris al ni ĉi malproksiman landon kun penetremaj kaj spritaj rimarkoj de la aŭtoro.

Prof-ro d-ro Walter Źelazny, bjalistokano de kvin jaroj, lekciis laŭ sociologia vidpunkto pri disvolviĝa vojo de la lingvo – de lingvo simia, tra Esperanto ĝis lingvo de komputiloj. Valoras substreki la signifon de ligo inter bjalistokaj esperantistoj kaj loka universitato, kio bone aŭguras pro nun kaj en estonto.

Multe oni parolis pri esperanta literaturo analizante kaj recitante la elektitajn ekzemplojn. Nicola Ruggiero de Italio okupiĝis pri verko de la elstara skota Esperanto-poeto William Auld, precipe pri „La infana raso”. Li montris ankaŭ la fragmentojn de ĉi poemo en la propra traduko italen.

Nelacigebla Elżbieta Karczewska kun vasta, samideana grupo prezentis ĉe muziko lertajn kaj spritajn tekstojn de Raymond Schwarz, kio ege amuzis la publikon.

Mi rakontis pri la komuna laboro ĉe la vasta aro de Wisława Szymborska-poemoj, kiu aperis antaŭ nelonge. La libro titolita laŭ unu el poemoj de la aŭtorino „Mi inventas la mondon” estas traduk-verko de mi, Tomasz Chmielik kaj ankoraŭ de kelkaj personoj. Krom tradukantoj laboris ĉe ĝi István Ertl (lingva revizio), Josip Pleadin (teknikaj aferoj), Marta Wierzbowska (projekto de kovrilo), Podlaĥia Libraro kaj Bjalistoka Esperanto Societo (eldono). Ĉiu plenumis la taskon laŭeble plej bone, do ni povas esti fieraj, ke la volumo kun n-ro 50 troviĝis en la prestiĝa sero de UEA Oriento – Okcidento. Simile pri ĉi tiuj aferoj mi parolis dum intervjuo, kiun kun mi realigis Stenia Romanowicz de redakcio „Senior Białystok”.

Ne mankis konsideroj pri la Esperanto-movado. Sara Spano kaj Francesco Maurelli prezentis nuntempajn esperantajn organizaĵojn malhumilajn rilate al la Majstro kaj postulantajn ŝanĝojn pensi pri „nia afero” kaj alimaniere realigi la devojn de esperantisto.

Ĉarma estis renkonto „Podlaĥiaj regionoj en objektivo de Anna Worowska”. La foto-artistino montris surfilme belajn kaj unike fotitajn pejzaĝojn kaj natur-detalojn kaj samtempe per varma, mola voĉo recitis siajn poemojn Jan Leończuk, poeto kaj direktoro de la Podlaĥia Libraro. Anna Worowska estas aŭtorino de kovriloj por esperante eldonitaj en Bjalistoko libroj, i.a. de kovrilo por miaj „Epizodoj”. Kun granda ĝojo kaj ia honteto mi akceptis de ŝi post la renkonto kadrigitan foto-bildon montrantan birdetojn sur abio, kio aspektas kiel la kristnaska abieto kun regule pendigitaj ornamaĵoj. Ĝi pendas en mia loĝejo kaj admiras ĝin ne nur mi.

Kelkfoje, okaze de Zamenhof-Tagoj estis organizita literatura konkurso. Ĉifoje okazis konkurso por leg-markilo. Venkis en ĝi lernanto de VII-a LO, Tomasz Dziemiańczuk.

Al junaj partoprenantoj kaj al certaj viroj precipe plaĉis „Esperanto per kurtaj ondoj” – radio-amatora programero de Stanisław Dobrowolski.

Ni vidis ankaŭ hispanajn dancojn fare de Akademio 50+, elpaŝon de antaŭlernejaj infanoj kaj aŭdis koncerton de infana muzik-ensemblo sub gvidado de Lech Mazurek.

La esenca manko por multaj partoprenantoj alkutimiĝintaj trinki la nigran kafon – estis manko de ĉi tiu nektaro. Kvankam bone provizitaj, aŭtomataj ŝrankoj sur liceaj koridoroj logis per diversaj frandaĵoj kaj trinkaĵoj la zorganta pri la junularo direkcio permesis al ili prepari nur kafon... grenan!

Jam tradicie oni metis florojn sub monumenton al L.L. Zamenhof, partoprenis en sankta meso en blanka preĝejo ĉe katedralo, kelkfoje ĝuis regalaĵon de mastroj en klubejo ĉe strato Piękna kaj formanĝis bonegan, ne tro dolĉan torton okaze de naskiĝdatreveno de la Majstro. Novaĵo estis servado ĉe ĝi de la hejma buzo – trinkaĵo el hordea kaĉo kun rozinoj.

Dimanĉe okazis la tuttaga ekskurso al du urbeto de la reĝo Sigismondo Aŭgusto – Knyszyn kaj Tykocin. Gvidis ilin sinjorino Iza, ĉiujare pli kaj pli bone reganta Esperanton.

Knyszyn estas situata sur norda-okcidenta ekstremo de Kniŝina Praarbaro. Ĝi ricevis urbajn rajtojn en la jaro 1568; poste ĝi apartenis al la reĝaj bienoj. Tia kastelo estis ŝatata loko de restado de la lastaj Jagelonoj. Tie mortis reĝo Sigismondo Aŭgusto en la jaro 1572. dum la dua mondmilito la urbeto estis ege detruita. La plej interesa loko de la ĉirkaŭaĵo estas situata en arbaro, post la urbeto, juda tombejo sur loko, kie pli frue estis multaj, vastaj fiŝaj laĝetoj.

Tykocin super Narew la urbajn rajtojn ricevis en 1425 jaro, sed oni skribis pri ĝi jam pli frue. De tiu dato ĝi estis propraĵo de familio Gasztołd, de la jaro 1479 ĝi fariĝis fondaĵo de la bernadana klostro kaj de la jaro 1542 ĝia posedanto estis reĝo Sigismondo Aŭgusto. Dum jarcentoj XVI-a kaj XVII-a la urbeto vere ekfloris. Sukcese laboris muelejoj, brando- kaj bier-farejoj. Dum svedaj militoj ĝi kadukiĝis. La Sejmo pro la meritoj donis ĝin al Stefano Czarniecki, sed baldaŭ ĝi fariĝis propraĵo de familio Branicki. Rekonstruis ĝin Johano Klemento Branicki en dua duono de XVIII-a jarc. Iom post iom Tykocin ruiniĝis dum XIX-a jarc., fortege tuŝis ĝin la dua mondmilito, tiam ĝi perdis la duonon da loĝantoj. Malgraŭ ĉio oni en Tykocin povas admiri aron de barokaj domoj masonitan de Johano Klemento Branicki, postmisiistan preĝejon al Sankta Triunuo (ĉirkaŭ 1750), pordegon kun skulptaĵon de J.Ch. Redler (1750), parokestrejon, malnovan hospitalon (1750), postbernardan klostro kun kapelo (1771-89) kaj monumenton al Stefano Czarniecki, kies aŭtoro estas P. Coudray (1713-70). konserviĝis ankaŭ memoraĵoj post multnombre tie loĝantaj judoj – sinagogo, domoj kaj interesa tombejo.

La ekskurso sukcesis malgraŭ aĉa vetero kun pluvo kaj neĝo. La bongustan tagmanĝon ni konsumis en bele rekonstruita kastelo en Tykocin, kie krome okazis elpaŝo de la loka ensemblo. Laciĝintaj kaj malvarmiĝintaj, sed kontentaj ni revenis en la varmajn brakumojn de sinjorino Sabina, de kiu post la tranokto oni devis starti perbuse al Krakovo. Ankoraŭfoje la podlaĥia regiono kontentigis niajn atendojn kaj programe kaj etose, plenuminte ĉiujn niajn bezonojn.

Lidia Ligeza

Jiří Čepelák

Junulino, kiu stumblis

Kiam mi vin unuafoje renkontis, vi estis feino, kiun oni licas sole adori. Ĉarma kiel la bildo de Rembrandt. Kaj same tiel neatingebla. Vere. Mi sekvis vin surstrate kaj mi deziris verki poemon. En tiu momento vi stumblis je trotuaro. Mi devis ridi. Ĝus mi ekkomprenis, ke vi estas homo. Kaj mi ekamis vin.

Saĝo de Thomas a Kempis

La nederlanda teologo kaj mistikulo (Tomaso de Kempis) naskiĝis en 1380, mortis la 25-an de julio 1471, membro de la aŭgustenana ordeno. Membro de la movado *Devotio moderna*, kiu, kontraste kun la spekulativa doktrino kaj ekstera ceremonieco, enfazis la internan piecon kaj agan amon. Cititaj ĉi tie pensoj devenas de lia ĉefa verko *De imitatione Christi* (Pri imitado de Kristo).

Devo sen amo morozigas.

Respondeco sen amo senskrupuligas.

Justeco sen amo eksigas mizerikordon.

Vero sen amo faras onin senkompate kritika.

Saĝo sen amo faras onin sagaca.

Afablo sen amo gvidas al hipokriteco.

Ordemo sen amo gvidas al pedanteco.

Honoro sen amo faras onin orgojla.

Havaĵo sen amo avarigas.

Kredo sen amo gvidas al fanatikeco.

Vivo sen amo ne havas sencon.

M. Bittnerová

Pri la valoro de homo

Mi ne estimas homon **ruzan**, ĉar li sekvas nur la propran profiton.

Mi ne estimas homon **profit-avidan**, ĉar li estas dependa de tiu eco, lia avido neniam satiĝas, li vekas naŭzon.

Mi ne estimas homon, kiu **multe parolas** kaj malmulton faras.

Mi ne estimas homon, kiu **multon promesas** kaj malmulte plenumas.

Mi ne estimas homon **egoistan**, ĉar li li estas senskrupula, li volas, ke ĉio turniĝu ĉirkaŭ li.

Mi ne estimas homon **malkuraĝan** (poltronan), ĉar li ne ŝatas porti responson.

Mi ne ŝatas homon **stultan**, kiu al ĉio kapjesas kiel azeno kaj ne havas eĉ iom da propra opinio.

Mi ne ŝatas homon **tromemfidan** (sintrotaksan), ĉar "Dio ja ne kreskigis arbojn ĝis la ĉielo".

Mi konsideras neniun **plene perfekta**, ĉar oni dum la tuta vivo devas lerni.

Sed mi estimas homon, kiu havas sian **klare konturitan karakteron**, ne lasas sin de iu kaj de io influi. Angloj tion nomas **gentlemano**.

tradukis Jan Werner

Ĉiuj tri tekstoj estis publikigitaj en aro de Jan Werner "Versa neversa mozaiko", Brno 2012

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontiĝoj 2016 j.

3. 03. 2016 j. – Andrzej Feuer. **Novaj mnemoteknikaj versaĵetoj.**

10. 03. 2016 j. – Lidia Ligeza. **Pri aforismoj el aro „Pikilo kaj mielo de saĝo”.**

17. 03. 2016 j. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj.**

31. 03. 2016 j. – Lidia Ligeza. **Pri dramo de Witkacy „En la eta biendomo”.**